

La Karavelo

*n-ro 010
julio-aŭgusto 2008*

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007



*Artur Azevedo (1855-1908)
brazila verkisto*

La Karavelo n-ro 010 julio-aŭgusto 2008

- | | |
|--|---|
| 1 Kovrilo: Arturo Azevedo | El la redakto |
| 2 Enhavo – Kolofono | El la redakto |
| 3 Esperanto... ĉu nur lingvo? (eseeto) | João José Santos |
| 5 Fernando Pessoa (poezio) Mesaço (28-a, 29-a) | João José Santos |
| 6 Friedrich August Wolf Al Napoleono Bonaparte (poemo) | Gerrit Berveling |
| 7 Ĉe Bajkalo somere (poemo) | Nikolaj Neĉaev |
| 7 Aŭtuno (poemo) | Luiza Carol |
| 8 nekonata aŭtoro Geavoj (poemo) | Edward Jaśkiewicz |
| 8 Diletanto (poemo) | Nikolaj Neĉaev |
| 9 La homa vintro (poemo) | João José Santos |
| 10 Romanco (poemo) | Simone Armand |
| 11 Erzsébet Bakonyi Sonoriloj vokas (poemo) | Tibor J. Szabadi |
| 12 Sándor Petöfi En patrujo (poemo) | Imre Szabó |
| 13 Guido Gezelle Kampulo Naz (poemo) | Leo De Cooman |
| 14 Recenzo: "A língua que veio do céu" | João José Santos |
| 15 Dosiero: Arturo Azevedo, brazila verkisto (6 paĝoj) | Roger Gotardi
João José Santos |
| 21 Fialho de Almeida La ĉemizo (rakonto) | Eduardo Novembro |
| 24 Fotoraporteto Vivanta scienco surstrate en Estremozo | João José Santos
João Pereira Santos |

Al blindaj homoj: Kunlaboru bv. por plibonigi la legadon de La Karavelo far blindaj homoj.

Uzado de tekstoj el La Karavelo: Ne uzu tekstojn el La Karavelo en alia publikaĵo, sen peti permeson de nia redakto.

Havinte permeson por uzi la tekstojn, ĉiam indiku la fonton. Ekz.: El la revuo "La Karavelo", n-ro 9, junio 2008, paĝo 5 ĝis 8.

La Barko: La artikoloj enhavantaj ĉi tiun bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon, aŭ tiun de viaj lernantoj.



Kolofono

Konstantaj verkistoj...

Eduardo Novembro
Edward Jaśkiewicz
Francisco Stefano Wechsler
Geraldo Mattos
Gerrit Berveling
Imre Szabó
Irina Mironova
João José Santos
Leo De Cooman
Luiza Carol
Nikolaj Neĉaev
Paulo Sérgio Viana
Roger de Castro Gotardi
Tibor J. Szabadi
Valentin Melnikov

Redaktisto

João José Santos

Asistanto pri dramo

João Pereira dos Santos

Reviziistoj

Kurt Fischer
Luiza Carol
Roger de Castro Gotardi
Valentin Melnikov

Telefono +351 268 919 000
PoŝTel. +351 960 13 15 15

Adreso

LA KARAVELO – Dr. João José Santos
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal

Recenzeblaj libroj

estu sendotaj al la supra adreso.

Reguloj

Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de La Karavelo, nepre elŝutu kaj legu la dosieron **Regularo de La Karavelo**, el la ĉefa paĝo de nia retejo. Ĝi estas konstante aktualigata.

www.esperantopt.com

lakaravelo@gmail.com

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos



Foto de João José Santos

Esperanto... ĉu nur lingvo?

de João José Santos

ENKONDUKO

Kelkfoje oni aŭdas de kelkaj esperantistoj la jenan esprimon: **Esperanto estas nur lingvo**. Por analizi la enhavon de tiu esprimo, oni devas unue kompreni, kio estas lingvo, kaj pripensi, ĉu tiu esprimo estas adekvata por kvalifiki iun ajn lingvon.

La fakto, ke ĉiu homo uzas almenaŭ unu lingvon, donas al ĉiuj ian sekuron de kompetento pri lingvaj aferoj. Ĉiuj homoj, sur nia planedo, manĝas. Tamen, kiom da ili scias ion pri proteinoj aŭ pri karbonhidratoj? Ĉiuj homoj pensas kaj iel kondukas, sed kiom da ili scias ion validan pri psikologio aŭ pri si mem kiel pensanta estulo? Ĉiuj ni parolas kaj uzas lingvon...

Lingvo estas tre kompleksa sistemo, kiu ne povas esti difinita. Difini lingvon estas tiel malfacile kiel difini homon. Do, ni rezignu pri scienca difino pri lingvo, konfesante la neeblecon fari tion, kaj ni strebu nur aludi al kelkaj el la ecoj, elementoj kaj fenomenoj rilatantaj la lingvon kaj la homan kapablon uzi lingvan sistemon.

LA HISTORIA PERSPEKTIVO

Ekde la paleolitiko, la homo evoluis vivante en socioj, ĉar unu el la plej gravaj ecoj de la homaro estas ĝia emo kunvivi en familiaj grupoj. La homo, devigata plu vivi en sia medio, lernis de la patroj kaj prapatroj, interŝanĝante spertojn kaj konojn, inter la diversaj homoj de la sama socio. Tiuj sociaj interrilatoj disvolvis la homan kapablon uzi signojn, kombini ilin por esprimi ideojn, kaj fiksi tiajn vortojn kaj sintakson, por ke la elementoj de la sama etno sin interkomprenu. Tiel, ĉiu homo heredas kulturon el sia etno, li mem influas sian etnon far siaj individuaj kulturaĵoj, kaj en tiu dialektika proceso, disvolviĝas pli kaj pli la kapablo kompreni novajn fenomenojn. Tiu kultur-psika evoluado sin apogas sur lingvo, evoluigas tiun lingvon, kaj tiu lingvo fariĝas instrumento de plua evoluo de la kulturo de tiu etno.

Iam en tiu proceso, la homo inventas manieron registri la parolojn fizike, por eternigi ilin, por certigi ke liaj prafiloj profitos siajn ideojn kaj konceptojn, kaj do inventas skribadon. Tiam oni forlasas prahistorion kaj komencas historion.

MI KODAS... VI MALKODAS...

Kiam du infanoj kunludas, okazas tre kompleksa fenomeno de interkompreniĝado. Ili prenas ludilojn, konataj de ambaŭ, kaj ili uzas tiujn ludilojn similmaniere, komprenante la regulojn de la ludo. Ili rigardas unu la alian, kaj iliaj rigardoj montras plaĉon aŭ malplaĉon, amikecon aŭ spiton, kaj multajn aliajn sentojn kaj dezirojn, ne facile esprimeblajn per vortoj kaj sintakso. Krome, ili parolas, kaj tiam okazas alia eksterordinara fenomeno. Mario diras al Ano, ke ŝia pupo nomiĝas Berto. Por fari tion, Mario pensis en sia lingvo, vortigis sian penson en tiu lingvo, sendante elektrajn informojn el la cerbo al la parolaj organoj. Ŝia lango vibras adekvate, ne pli kaj ne malpli laŭte ol ŝia deziro, kun la taŭga tonvarieco, akompanante sian rigardon kaj la movon de ŝia maneto, kaj jen... ŝi vibrigis la aeron, kiu kondukis laŭ ondoj ŝiajn intencojn al la orelo de Ano. Tiam, la timpanoj de Ano fulmrapide kondukis la vibron al ŝia cerbo, kie Ano, interpretis tiujn elektrajn elementojn kaj mense vortigis la parolon de Mario. Tiam, samtempe, brile ŝi komprenis ĉion, ridetis, kaj la konversacio daŭras nature dum horoj, dum ambaŭ amikinoj kunludas. Ili ne scias, kiel tio okazis, sed ili faras tion tre kompetente.

Mi ne kapablas science difini lingvon. Ĉu eĉ Wittgenstein kapablis? Mi ne kapablas kompreni, kun scienca precizeco, kio okazas kiam mi parolas. Sed ion mi scias: mi scias, ke **lingvo ne estas nur lingvo**. Ĉu paradoksa!? Nu, eble la vivo estas tia.

PAROLANTA ANIMALO HAVAS KULTURON

Mario kaj Ano interkompreniĝas tre bone, ne nur pro tio ke ili konas la vortojn kaj la sintakson unu de la alia, sed ankaŭ pro tio, ke tiuj vortoj kaj sintakso implicas komunajn kulturajn elementojn, kie la filozofiaj valoroj ludas gravan rolon. Jes, jes! Mario kaj Ano, kvankam 5-jaraĝaj knabinetoj, ne nur kapablas uzi kompleksan parolan sistemon, sed ankaŭ kapablas akordi aŭ malakordi pri aferoj tiel gravaj kiel, ĉu oni manĝigu la pupojn, ĉu oni dronu ilin en la lageton, ĉu karesi ilin, ĉu bati ilin. Ili kapablas, pere de

siaj agoj, montri la valorojn, en kiuj ĉiu el ili kredas, kaj ili eĉ kapablas hierarkii tiujn valorojn, ĉar Ano scias ke ŝia pupo devas unue manĝi, kaj nur poste ludi; do, laŭ ŝi, la valoro **manĝi por pluvivi** pli altas ol la valoro **ludi por amuziĝi**. Tamen, tiuj 5-jaraĝaj knabinoj neniam studis filozofion.

Animalo, kiu parolas, nepre havas kulturon. **Do, tiu parolata lingvo ne povas esti nur lingvo, ĝi estas ankaŭ kulturo.** Kiam oni diras, ke lingvo estas nur lingvo, oni reduktas tiun lingvon al frosta signosistemo, kvazaŭ ĝiaj uzantoj estus robotoj.

LA ESPERANTISTARA ĈIELARKO

En ĉi tiu punkto, ni devas ekpensi, kiuj estas la kulturaj elementoj komunaj al la esperantistoj.

Parolante pri tiaj svagaj aferoj, malfacile precizeblaj, oni ne povas analizi la temon per komparo inter du homoj, sed per ĝeneralaj trajtoj facile agnoskataj de la propraj homoj de ĉi tiu internacia komunumo, kiun ni nomas esperantistaro.

Ĉi tiu komunumo ne akordas pri multaj vivdimensioj, kaj enhavas aliajn grupojn. Religie ni estas katolikoj aŭ oomotoj, ortodoksoj aŭ spiritistoj, ateistoj aŭ skeptikistoj, ktp. Se oni parolas pri politiko, oni trovas aliajn grupojn, kaj same se oni parolas pri aliaj homaj grupoj rilatantaj specialajn konceptojn. Ĉu do, agnoskante ĉi tion, oni povas aserti, ke la esperantistaro konstituas komunumon, kun kultura denominatoro, kvankam ni estas tiel malsamaj, se oni analizas la aferon laŭ multaj perspektivoj, kiel religio, politiko, raso, etna lingvo, manĝomoroj, ktp?

Se ĉiu el ni pripensas sian propran patrion, facile alvenas al la konkludo, ke ĝi konsistas el homoj tre diversaj laŭ la supre menciitaj perspektivoj, i.a., sed ke kelkaj gravaj ecoj permesas al ili diri: ni konstituas etnon. Same okazas pri la esperantistaro. Do, la fakto, ke ni estas tiel heterogena grupo, ne pruvas, ke ni ne konstituas kulturan komunumon kun precizaj trajtoj. Tiu varieco nur pruvas, danke al Dio, ke ni ne konstituas sekton, kaj ke ni estas liberaj homoj.

LA ESPERANTA KULTURO

Kiam oni studas etnan lingvon, oni studas ankaŭ la karakterizaĵojn de la popolo, kiu kreis

kaj evoluigis tiun lingvon. En la lernolibroj aperas turismaj vidindaĵoj, manĝaj receptoj, folkloraj fotoj, kaj mencioj pri la moroj de tiu popolo. Kiam oni enprofundiĝas en tiun studon, venas la historio de tiu popolo, ĝia marŝo el la brutaj valoroj al pli decaj, kaj poste, jes, nur poste, venas ĝiaj aŭtoroj, la verkistoj, kaj, en la supro, la poetoj. La poetoj, jes, tiuj homoj, kies korvibro disparfumas la kredojn kaj morojn de la popolo, kvazaŭ ili mem surcentrigus sur si la kolektivanimon de sia gento. Ĉu la angla estas nur lingvo? Ĉu la portugala estas nur lingvo? Ĉu la araba estas nur lingvo? Ĉu esperanto estas nur lingvo?

Se esperantisto neniam legis kelkajn poemojn de Zamenhof, de Kabe, de Kaloczaj, de Auld, aŭ de multaj aliaj el niaj poetoj, eble li pensas, ke esperanto estas nur lingvo. Se esperantisto fajfas pri la historio de esperanto en tiom da landoj, pri politikaj persekutoj kaj heroaj helpoj, pri ŝtataj agnoskoj, pri desubismaj kaj desuprismaj agoj, jes, eble tiu esperantisto asertas, ke esperanto estas nur lingvo. Se esperantisto neniam rimarkis, ke malgraŭ diskutoj kaj eĉ disputoj, la esperantistaro konstituas internacian komunumon da homoj, kiuj sin interrespektas, amikumas, sin aprezas, kaj kies koroj vibras por la paco, por la homara respekto, por la fino de la diskriminacioj... jes, tiu esperantisto estas tre distriĝema, kaj do li asertas, ke esperanto estas nur lingvo.

ESPERANTISTARAJ ECOJ

Kiuj estas do la ĝeneralaj ecoj de ĉi tiu internacia komunumo, kies historio jam aĝas 121 jaroj? Jen, laŭ simpla maniero: ŝatado al internacia vivo; gastamo; ĝenerala intereso pri lingvoj; ĝenerala intereso pri etnoj, ĉefe se minoritataj; deziro respekti kaj respektigi la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj; profunda strebo al la internacia paco,...

Certe estas aliaj gravaj kultureroj, ne intence forgesitaj de mi, sed ĉi tiuj elementoj jam sufiĉas por montri, ke fakte ni konstituas internacian komunumon, kies trajtoj estas tiuj dezireblaj, por ke la Tero estiĝu pli bela ĝardeno por la infanoj de la estonto.

* * *

Kaj nun, plu en la legadon de monata 24-paĝa literatura revuo, verkita de pli ol 20 homoj el ĉirkaŭ 15 landoj... Ĉu esperanto estas nur lingvo? ;)

Mesaĝo

de Fernando Pesoo

trad. João José Santos, el la portugala

9. ĈIELSORO DE VASKO GAMO

La dioj de l' turment' kaj la teraj gigantoj
tuj ĉesas en moment' fion de militantoj
kaj gapas. Tra la val', en lok' de l' ĉielsoro,
silentas. Jen vualoj stas en ondoformo,
nebulas movo enta, aperas fantomo.
La timoj dume flankas lin, ombre ĉe ombro,
kaj diste spurstri' roras en nuboj kaj flamoj.

Surtere, falas fluto de paŝtist' glacia.
Observas li ekstaze, sub mil tondro-fulmoj,
ke al la Argonaŭt' la ĉiel' stas aperta.



Vasco da Gama (1469-1524)
malkovris la marvojon al Hindio en 1498

10. PORTUGALA MARO

Ho sala maro, kiom da sal' via
larmado stas portugalia!
Pro navig', kiom da patrinoj ploris,
kiom vane filoj preĝprovis,
Kiom da fianĉinoj sen par',
pro via posedo, ho mar'!

Ĉu indis? Ĉio indas, se l' animo
plenas je honor' kaj sublimo.
Dezirante transpasi Boĝadoron,
nepre transpasu la doloron.
Al mar' abisma Di' donis danĝeron,
sed montris sur ĝi la ĉielon.



Foto de maro respegulanta la ĉielon

El la fora latina...



Foto de Gerrit Berveling.

Al Napoleono Bonaparte

de **Friedrich August Wolf**
(1759-1824)

trad. **Gerrit Berveling,**
el la latina

Mi profetas ke jen naŭmaĥiaj laŭroj vin kronos
Je la tempioj; kaj ne mar' desapontos al vi.
Via popol' nuligos ĉiujn; ne venka Gaŭlio
Estos rompita je l' fin' ĉe la Brita strand'.
Bona sort', ne misorto finos batalojn; do tial
Pri vi diros estont': "Part' bona – ne mava Part'!"

Noto

Kuriozaĵo de tiu ĉi poemeto estas, ke la Latina originalo estas ekzakte inverse legebla; sed tiam la – ŝajna! – laŭdego al Napoleono ŝanĝiĝas je atako kontraŭ li. En Esperanto eblas fari tion nur parte.

Jen: "Part' mava – ne bona Part'": estont' tial diros pri vi; batalojn finos misorto, ne sort' bona; ĉe la Brita strand' je l' fin' rompita estos venka Gaŭlio [= Francio]; ne ĉiujn nuligos popol' via; al vi desapontos la mar' kaj ne je la tempioj kronos vin laŭroj naŭmaĥiaj [= marbatalaj]: jen mi profetas!

www.esperantopt.com



Friedrich August Wolf
(1759-1824)

estis fama Germana filologo. En la prepara lernejo li lernis – parte aŭtodidakte – apud la Germana la Latinan, Grekan, Francan, Italian, Hispanan kaj muzikon. En 1777, post dujara plua studado je propra iniciato (li ne estis vere kontenta pri la lerneja sistemo de sia ĉirkaŭo), 18-jara li iris al la universitato de Göttingen, kie li enskribiĝis ĉe la neekzistanta fakultato "filologio". Wolf malpaciĝis kun la tiea / tiama gvidanta fakulo pri la Latina, Ch.G. Heyne, (1729-1812) kaj rezulte de tio Wolf estis ne plu akceptata ĉe la lekcionoj. Li daŭrigis siajn studojn en la universitata biblioteko. Depost 1779 li mem komencis instrui. En 1783 li fariĝis profesoro en Halle (Prusujo). En tiu tempo li vere fondis la sciencon "filologio", pri kiu li tiom sopiris. Lia plej fama verko estas *Prolegomena pri Homero* (1795), en kiu li metis la bazon por la "moderna" scienca traktado pri la patro de l' Eŭropa poezio.



*En karavelo esperantisma...
ĉiu poeto rajtas ĝui sian sezonon eĉ dissezone...*



de Nikolaj Neĉaev

Foto de Nikolaj Neĉaev.

Ĉe Bajkalo somere

Ĉe Bajkalo zorgoj vanas,
Mi nenion faras mem:
Korpon mian maro banas,
Koren venas la poem',
Min karesas sabla molo,
Min freŝigas venta blov',
Min varmigas suna bolo,
Min dormigas tajda mov'.



Foto: Ĝardeno en somero.



Foto: Ĝardeno en aŭtuno.

de Luiza Carol




Foto de Luiza Carol

Aŭtuno

aŭskultu venton kiu blovas de montetoj
forflugis jam mia somero
la rozo bonodoras
jen la ĉielo grizabluas

forflugis jam mia somero
mi vivos ĉi-aŭtune nur laŭ mia plaĉo
la lago grizabluas
tuj mia revo veros

mi vivos ĉi-aŭtune nur laŭ mia plaĉo
la rozo bonodoras
tuj mia revo veros
aŭskultu kanton kiu venas de montetoj



Foto de Jaśkiewicz.

trad. Edward Jaśkiewicz

Geavoj

de nekonata aŭtoro

Ĉe l' fenestr' iu migranto iris,
de kie kriaĉ' aeron ŝiris.
Kverel' geava estis nervoza,
migrant' ne sciis ĉu ĝi serioza.

Avin' riproĉis: Ne puŝu tiel,
oni ja devas puŝi aliel.
Pretigu bone, ĝi mem eniros.
Vi sentaŭgulo ĝin ne akiros!

Ankoraŭ foje ĝi ĵus eliris,
ho, vi mallerta ĝin mem eltiris!
Centrigu rekten, en truon ŝovu.
Vi plu nervozi min jam ne provu!

Ĉu vi ne vidas, ke ĝi vastranda?!
Tamen stultaĵo, tru' ne malgranda.
Malgraŭ kelkfoje vi jam ripetas,
sed sen rezulto vi ĝin enmetas.



Foto: Ĝardeno en vintro.

Mi tuj vin helpos, ĉi tie tenu
kaj per piedoj depuŝi penu.
Ho, vi gapulo konstanta ĉiam
eble vi tion faros neniam!

Migrant' mizera longe hezitis,
fine al tim' pro scivolem' spitis -
geavojn vidas li tra l' fenestrovitro
ŝovantajn tubon al forn' - pro vintro.



Foto: Ĝardeno en printempo.



Diletanto

de Nikolaj Neĉaev

Per milopo da sunetoj
Min blindigas flakoj multaj.
Milionoj da poetoj
En printemp' ne estas mutaj.

Same mi en mart' parolas
Verse, strofe, trile, kante.
En printemp' mi ree rolas
Lirikiston diletante.

La homa vintro

de João José Santos



Printempe vi burĝonis, rozo de l' ĝardeno.
Somere en Edeno, fruktojn vi eldonis!
Folioj en aŭtuno falas... Kaj en vintro
la arboj nudas, frostas kaj vizaĝo palas.



Ĉu triste vivi do plejparton de la vivo,
ĉar najtingalo ne plu lirlas? Stas ne saĝe!
Profitu nun, pli aĝe, ke lernis vi liri,
aŭ lernu ami, ĉar atendas mano manon.



Ho, kverko senfolia, kien nun vi iras?
Jen glano via, jen estonto via tie!
Somero stis printempo, aŭtuno vintriĝos...
El kie venas vivo? Kien iras morto?



*Fotoj de la kvar sezonoj
en la sama ĝardeno.*



*Foto de senfolia arbo
en sudo de Portugalio.*




Foto de Simone Armand

de Simone Armand

Romanco¹

Blankaj petaloj, teneraj langetoj,
Ora koro, luma koro,
Frenezaj tigoj², lertaj baletistoj³,
En herbejo, sub hela ĉielo,
La lekantoj revas⁴ pri ĉarma princo.

Amantaj floroj: iom, multe, pasie⁵,
Floroj de ĉiamaj amoroj⁶,
Sub vento disfluantaj petaloj,
La lekantoj turniĝadas ĉie kareseme.

Ami, amiĝi, fervoraj karesoj,
Trinki la sunon, luliĝi printempe,
Ludas dolĉa vento al vi flustrante⁷.

Je l' unua velka⁸ petalo⁹,
Larm' arĝenta fluas en sulko...
Al vi mia koro kliniĝas.

Je la lasta velka petalo,
je korŝire flua veploro...
Ĉu al vi kor' mia flirtiĝas¹⁰?

Simone Armand

naskiĝis en 1929, en vilaĝeto de pariza regiono, Francujo. Profesie, ŝi instruis en baza lernejo, nun emeritas.

Ŝi esperantistiĝis en 2003, unue per ret-kursoj, poste per korespondaj kursoj.

Simone debutas en La Karavelo per sia poemo «Romanco».

Amludeto

La geamantoj eltiras ĉiun petalon de lekanto, unu post la alia, dirante unu vorton en la momento de ĉiu eltiro:
mi amas vin – iom – multe – pasie – pasiege – freneze – tute ne!
La ludo daŭras ĝis la lasta petalo. Atentu al la lasta vorto, ĉar tiu plej valoras! Kaj ne trompu!



Foto de lekantoj

1 Romanco: komponaĵo por kanto kaj piano.

2 Tigo: branĉeto de planto, kie kreskas folioj, burĝonoj kaj floroj.

3 Baletisto: danco farata de profesiuloj, en kiu la dancisto sin apogas per la pinto de la piedaj fingroj.

4 Revi: fantazii kvazaŭ en sonĝo.

5 Pasio: ama sento de homo al alia, kiu incitas lin al amoro.

6 Amoro: dio de la pasio, kiu portas sagojn. Amori: seksumi.

7 Flustri: paroli tiel mallaŭte ĉe la orelo de alia homo, ke nur tiu kapablas aŭdi.

8 Velki: perdi la vivecon ĉefe pro maljuneco. Tio okazas ĉefe en aŭtuno, kaj pro tio la folioj falas.

9 Petalo: korola (flora) folio.

10 Flirti: flugeti en aero, kiel eblas al plumoj. Amindumi.



trad. Tibor J. Szabadi

Foto de Tibor J. Szabadi.

Sonoriloj vokas¹

de Erzsébet Bakonyi²

Erzsébet Bakonyi

estas ĵurnalistino. Ŝi laboras ĉe la urba ĵurnalredaktejo. Ĝis nun estas eldonita unu ŝia poemlibro, kaj multaj ŝiaj poem-publikaĵoj aperis en diversaj eldonaĵoj.

Al Romo portis
la sonorilojn la anĝeloj.
Ĉu ili iam revenos
al la preĝejo de mia eta vilaĝo?
Tie pacon, trankvilon oni spiras,
venis kune la popolo,
dume hejme prepariĝos la festa tagmanĝo.

Eble ili revenos!
Vokas ilin la krepuska procesio,
preĝo de releviĝo.
Ĉi muta horo sur la dornoplena Golgota,
kie vidis la Patrino sur la kruco sian suferantan filon.
Dolore! Sufiĉe! Vivi bele!

Ĉu vidis vi Judason, la vulp-vizaĝan estulon,
kiel li inside³ proksimiĝas vin,
kliniĝadas, larĝ-buŝe rikane demandas,
kiel vi fartas, kaj pro via faligita senkulpa vorto,
ekaptas vin, kiel la hieno la grasan oston!

Kiu estas vi? Vidu en la spegulo!
Ĉu taŭgas al via kapo la dornokrono?
Se ĝin vi tiros, ne lasu mem!
Deprenu kaj reĵetu!
Vian kurban dorson la pezo
de l' kruco surpremas teren?
Ne timu! Iu ĉiam
leviĝos, kaj viŝos mi
de via torturita vizaĝo la turmenton!



Bildo de Jesuo krucumita.

Kiu estas vi? Ĉu vi estas Judaso?
Estu centfoje kompromita,
per stulteta orgojlo traktita,
merite la dornokronon!
Se vi estas fiulo,
vivi por vi ne indas.

Bimm-bamm, bimm-bamm,
vokas la sonoriloj
al la preĝejo de mia eta vilaĝo,
kie pacon kolektas la popolo,
dume pretiĝos hejme la tagmanĝo.

¹ Hungara titolo: "Harangok hívnak".

² Legu hungare [erjhe'bet 'baakonji].

³ Insidi: sekrete trompi.

El la hungara bukedo...

Foto de Imre Szabó

trad. Imre Szabó**En patrujo**
hungare: *Hazámban***de Sándor Petőfi**

Ebena lando kun orspik-ornamo,
leĝere supre la fatamorgano
prezentas ŝvebe gajan fe-ludilon.
Ĉu vi min konas? Konu vian filon!

En ombroj de ĉi-poploj mi ripozis,
antaŭ longege tio okazis,
dum superkape tra la aŭtunaero
de viaj grupoj flugis V-litero.

Kiam sur sojlo de la praa domo
mi ĝison diris kun rompita tono;
la lastajn benajn vortojn de l' patrino
disportis jam la ventoj al senlimo.

Jarvico longa de tiam aperis,
jarvico longa de tiam pereis,
per ĉaro de fortune ŝanĝiĝema
mi vagis tra la mondo surpriz-plena.

La vivlernejo estas mondo granda.
Tiom da ŝvito estis forfluenta,
la vojo krute kuras, malebenas,
kaj oni ofte en dezerton venas.

Kiel neniuj, mi ja tion konas,
mi, kiun sperto ja ĉiam admonas
artemizion donis ĝi malhele,
mi pretas trinki morton ja prefere.

Nun la malĝojon longan kaj doloron,
kiuj oftege tuŝis mian koron,
kaj la memoron de ĉiu torturo
dislavas sankta larm' de ĝojpuro.

Ĉar kie en la mola lulilsino
gustumis mi la lakton de patrino,
plensune brilas vi al fidelanto,
al via filo, kara patrolando.

Foto, en fono, de juna feino



Foto de
Leo De Cooman.

El la nederlanda florado...

trad. Leo De Cooman

Kampulo Naz¹

de Guido Gezelle

Kiu ne jam aŭdis kanton,
kanton pri kampulo Naz?
Leonkoron ja ne havis,
tamen stulta li ne estis.

Kampul' Naz jen ĵus vendinte
bovan duon en la urbo
kun si portis, hejmirante,
sescent frankojn en monuj'.

Kampul' Naz, nur simpla ulo,
tamen havis cerbon klaran,
seppafilon li aĉetis,
kaj en ĝin li metis kuglojn .

Tiel marŝis Naz malpeze,
kvankam pezis la monujo;
diris li: "Aĥ, volus mi jam
esti hejme kaj en mia lito."

Subite, kion aŭdas kampul' Naz,
jen post li en tiu trunko?
Io gvas² kaj moviĝas;
pensas Naz jam pri la mort'!

Kaj antaŭ ol la ul' enspiris
post tiela ektimego,
kaptas Nazon du manegoj,
kaj jen kuŝas li sur ter'.

Li nek aŭdas nek plu vidas,
kaj nenion plu li sentas,
li nur vidas pistolegon
kaj la diron "... Pafos mi!"

"Pafos mi se vi ne tuj
al mi donos ĉiun monon,
ĉe ekmoŭvo via, ulo,
lasta tago estos via!"

Kampul' Naz, preĝinte ĉiutage

1 Sudnederlande: "Boerke Naas".
Verkita en 1868/10/17.

2 Gvati: kaŝe observi.

kvin, ses preĝojn brako-kruce,
por ke longe vivu li, tuj ekvidas:
la gravegon de l' problem'.

"Kion diros ŝi," ekkrias Naz,
kiam hejmen mi revenos:
"Li denove ĉiom drinkis,
drinkemulo, jen denove!"

"Aŭskultu, mia kara, kaj bonvolu
montri vin esti bonkora,
aĥ, pafu kuglon tra l' ĉapelon
evitu plendon de l' edzin'!"

Diros mi veninte hejmen:
"Ŝtelis oni mian monon,
kaj malgrandis la ekarto³
al la traf' de mia kap'!"

La ŝtelisto pli avida al la mono
ol al sango de ul' Naz
pafas tuj la kuglon
tra la bulo de l' ĉapel'.

"Dankon!" diris Naz, jam kaptas baskon
"Pafu unu tra la jakon"
Al ŝtelisto tenas Naz nun
la kapoton por la paf'.

"Tra l' pantalonon pafu unu,
por ke kredu la edzin',
ke mirakle mi eskapis
el danĝero de la viv'!"

La rabisto diras "Jam sufiĉas!
Vian monon nun, rapidu,
mi tempon, kuglojn ne plu havas..."
"Mi jes", diras Naz, "Jen mi ja!"

La seppafilon prenas Naz nun
kaj ekdiras: "Se ne tuj
kaj senprokraste vi forkuros,
vin, fripono, vin mi pafos!"

"Se alproksimiĝus vi, mi pafus
stultan kapon en pecetojn
kaj se ree vi prirabos,
la prudenton ne forgesu!"

Kaj forkuris la rabisto,
piedojn el sub sia korpo,
rapidege kaj maleblas ĝin priskribi
kiom ajn rapide mi eĉ skribus!

Jen mi haltas. Aliulo nun priverku
kanton pri kampulo Naz
Vere, leonkoron li ne havis,
sed stultemon ankaŭ ne!

3 Ekarto: Scienca vorto uzata en diversaj fakoj. Ĉi tie, la
senco estas milita: Distanco inter la celita kaj la trafita
punkto.





El la portugala muzo...

Recenzo:

La lingvo, kiu venis el la ĉielo

kion la spiritoj diras pri esperanto

de João José Santos

origina titolo:

A língua que veio do céu

lingvo: portugala

aŭtoro: diversaj spiritoj

organizinto: Homarano

eldonis: Centro Espírita Léon

Denis - Editora

paĝoj: 230

formato: 17cm x 15,5cm

eldondato: Rio de Janeiro, 2004

trovebla: editora@celd.org.br



Bildo de la kovrilo.

Estas sciate, ke esperanto ne disvastiĝas laŭ la sama maniero en la diversaj landoj.

En Brazilo, homoj tre diversaj, laŭ religio kaj kulturo i.a., disvastigas kaj instruas nian lingvon. Inter ili, la brazilaj spiritistoj ĉiam komprenis la grandan valoron de esperanto en la konstruado de pli bona mondo, kaj pro tio, ili sin dediĉis entuziasme al ĉia agado rilatanta esperanton, ekde kiam Valdomiro Lorenz enkondukis esperanton en Brazilon. Ne temas pri unu aŭ alia spiritisto, kiu interesiĝis pri esperanto. Temas pri miloj da homoj lernintaj esperanton en la spiritismaj asocioj, temas pri multaj bonaj verkistoj dum la tuta 20-a jarcento, kaj temas pri gravaj spiritismaj institucioj, kiel la Brazila Spiritisma Federacio (FEB), kiu dum longa tempo uzis la sloganon *Evangelio, Spiritismo, Esperanto*. Bedaŭrinde, kvankam FEB plu laboras por esperanto diversmaniere, ĝi ne plu uzas la saman sloganon.

Brazilo havas unu el la plej brilaj historioj de sukceso en la disvastigo, instruado kaj verkado de esperanto, kaj estas juste agnoski, ke la kontribuo de la spiritistoj estis tre grava.

Ne enirante en religiajn klarigojn, kiuj ne estas speciale interesaj al homoj sen spiritisma kulturo, gravas komprenigi la

gravecon de ĉi tiu libro verkita en la portugala, kaj kies esperanta traduko havos intereson por homoj kredantaj la reenkarniĝon, inkluzive tiujn, kiuj ne estas spiritistoj. Temas pri religia libro, plena je spiritaj konsiloj por ke la adeptoj de spiritismo lernu kaj uzu esperanton kiel pacigilon.

En la prezento de la libro, en la paĝo 11, Affonso Soares asertas¹:

*Kvankam Esperanto ne havas religian econ, en la strikta senco de la termino, tamen ĝi radikiĝas el unu el la plej propraj ecoj de la vera religio, kio estas la **universala frateco**, la proksimiĝo de l' koroj, super ĉiuj ajn diferencoj, kiuj provizore distingas la homojn en la mondo: rasaj, lingvaj, religiaj, seksaj, naciaj, inter multaj aliaj.*

El la citita tekstero, oni ekkomprenas, kio gvidas la spiritistojn al esperanto, t.e., la **universala frateco**. Kvankam la afero povas ŝajni tre evidenta, tamen ĝi ne estas tia, ĉar ja ne ĉiuj religioj entuziasme uzas esperanton, kaj en aliaj landoj, kiel ekzemple en Portugalio, la spiritistoj ne havas la saman komprenon, ke esperanto enkadriĝas perfekte en siaj religiaj kredoj kaj celoj. En la sekvanta paĝo, Soares mencias la celon de la libro:

(... ĉi tiu libro) estas povplena ilaro por la disvastigo de la esperanta idealo inter la spiritistoj, kaj por fortikigo de la idealo por tiuj, kiuj jam sin dediĉas al (esperanto ...)²

En la paĝoj 22-23, Emmanuel, per kompara tropo, klarigas, ke tiel kiel spiritismo ne venis al la mondo por detrui la aliajn religiojn, ankaŭ esperanto ne venis por detrui la aliajn lingvojn, eĉ kontraŭe, nia lingvo venis por protekti la aliajn.

Dum multaj jaroj, mi legis, en la brazila spiritisma literaturo, la mildajn voĉojn, kiuj gvidis min al esperanto, kaj mi multfoje deziris, ke oni kompilu tiajn tekstojn en libron. Jen ĝi. Dankon, do, al Homarano, la organizinto, kies veran nomon mi ne konas.

Do, ĉi tiu libro prezentas validan kaj honestan argumentaron por la disvastigo de esperanto far spiritistoj kaj aliaj, en la kultura spaco de tiaj doktrinoj.

¹ Traduko de JJS el la portugala. La nigrito estas de la tradukinto.

² same



Arturo Azevedo (1855-1908), biografio de brazila verkisto

de João José Santos



Sur la kovrilo de ĉi numero de La Karavelo kaj plus ses paĝoj (p. 15-20), L.K. kunmemoras la centjariĝon de la morto de tre interesa brazila dramisto, poeto kaj rakontisto, kiu favoris esperanton. Liaj verkoj, leĝeraj, bonhumoraj kaj didaktikaj, havas evidentan intereson por la esperanta legantaro.

Du fotoj de Arturo Azevedo.

Artur Nabantino Gonçalves de Azevedo,

brazila verkisto, naskiĝis en la 7-a de julio 1855 en San-Luís de Maranjo¹, kaj mortis en la 22-a de oktobro 1908, en Rio-de-Ĵaneiro. Li estis tre aplaŭdita, populuma kaj multproduktanta teatroverkisto.

Kiam li estis 8-jaraĝa, jam montris emon al la teatro, lude adaptante tekstojn de Joaquim Manuel de Macedo. Nur 15-jaraĝa, ankoraŭ en sia naskiĝurbo, li verkis la spritan komedion *Amo per Proverboj* (vidu p. 18), kiu estis prezentata la unuan fojon en la teatro São Luís, kaj tuj altiris la atenton de la publiko.



Detalo de São Luís, kie la dramisto naskiĝis.



Mapo de San-Luís de Maranjo, kie naskiĝis Arturo Azevedo.

maldungis lin pro liaj satiroj kontraŭ ŝtataj aŭtoritatoj. 18-jaraĝe, li translokiĝis al Rio-de-Ĵaneiro, kie li estiĝis ĵurnalisto. Tie li verkis kaj prezentis, ĉiam kun granda sukceso, siajn multnombrajn teatraĵojn. En 1871, li publikas sian unuan poemolibron: "Carapuças". En 1873, li dungigis ĉe Ministerio pri Agrokulturo.

Rakontisto, poeto, dramisto kaj ĵurnalisto, Arturo estis filo de la portugalia vic-konsulo David Gonçalves de Azevedo kaj de Emília Amália Pinto de Magalhães. La geedzoj havis tri filojn kaj du filinojn. Lia frato estis la fama brazila romanisto Aluísio de Azevedo (1857-1913), eĉ multe pli fama ol Arturo.

¹ Portugale: São Luís do Maranhão.
Vidu <http://eo.wikipedia.org/wiki/Maranjo>

Li laboris en la gazetoj "O Paiz", "Correio da Manhã", "Diário do Rio de Janeiro", "O Mequetrefe", "Kosmos", "O Século", kaj estis priteatra kritikisto en "A Notícia". Arturo Azevedo fondis la revuojn "O Domingo", "Revista dos Teatros", "A Gazetinha" kaj "O Álbum".

En la komenco, li faris liberajn tradukojn kaj adaptojn de francaj komedioj. Lia unua teatra sukceso, "A Filha de Maria Angu", estis brazila imitaĵo de la franca opereto "La Fille de Mme. Angot". Arturo tradukis pli ol 40 teatraĵojn.

En la fino de la 19-a jarcento, Arturo Azevedo furoris en la brazila teatro. Li lasis ĉirkaŭ 25 komediojn, 19 teatrumojn kaj 20 operetojn, kelkajn burleskajn. Krome, li estis unu el la responsuloj pri la konstruado de Teatro Municipa de Rio-de-Janeiro, inaŭgurita tuj post lia morto. Tre popoluma aŭtoro, Arturo farbis fortkolore la epokon de la fino de l' Imperio kaj komenciĝo de l' Brazila Respubliko.

Plej famaj teatroverkoj: "O Dote" (La Doto), "A Jóia" (La Juvelo), "O Oráculo" (La Orakolo), "Véspera de Reis na Bahia" (Antaŭtago de l' Tlireĝa Festo en Bahio), "A Capital Federal" (La Federacia Ĉefurbo), krom "Amo per Proverboj".

Li estis unu el la kreintoj de la nomata "Normala Teatro", kiu situis ene de la institucio Portugala Kabineto de Legado. Por tiu teatro, li verkis dramojn kaj tie li ludis kiel aktoro.

Arturo aktive partoprenis en la sklavabolaj kampanjoj, per gazetaj artikoloj, kaj per surscenado de dramoj, kiel "O Liberato".

En 1897, li estis unu el la fondintaj membroj de Brazila Beletristika Akademio².

En 1898 li publikis en la ĵurnalo "O Paiz" artikolon favoran al esperanto (vidu p. 17), kaj ĝis sia morto li ĉiam montris simpatian al nia lingvo. Tiu artikolo allogis al esperanto la estontan gravan esperantiston Antônio Caetano Coutinho, i.a.

EN ESPERANTO

En esperanto, oni konas nur la verkon de Arturo Azevedo *Amo per proverboj* (vidu p. 18), tradukitan de Couto Fernandes, kaj nun

² http://eo.wikipedia.org/wiki/Brazila_Beletristika_Akademio



Busto de Arturo Azevedo



Teatro "Arthur Azevedo", en São Luís. Inaŭgurita en 1817, ĝi estas la dua plej antikva en Brazilo.

la artikolon el la gazeto "O Paiz" (vidu p. 17) kaj la rakonton *La maljuna Limo* (vidu p. 19-20), ambaŭ tradukitajn de Roger Gotardi por la legantaro de La Karavelo.

El la portugala muzo...



Bildo de Roger Gotardi

**trad. Roger de Castro
Gotardi, el la portugala**



El la gazeto "O Paiz"¹, 12-an de aprilo 1898. Rubriko: "Palestra"^{2 3}

de Artur Azevedo

En 1887, d-ro Zamenhof – pro tiu *of* ĉiuj jam scias, ke temas pri ruso – verkante sub la pseŭdonimo *esperanto*, kreis internacian lingvon multe pli akceptindan, multe malpli komplikan, ol la furoran *volapukon*, kiun mi vane pretendis lerni.

La nova lingvo, konata, pro tiu pseŭdonimo, per la nomo *esperanto*, jam antaŭ 10 jaroj estas vaste disvastigata, kaj jam havas multenombrajn adeptojn en ĉiuj partoj de la mondo.

En januaro de ĉi tiu jaro, estis fondata en Parizo la *Société pour la propagation de l'espéranto*⁴, kaj estis publikigata la 1-a numero de *L'espérantiste*⁵. S-ro Jacome Martins Baggi de Araujo, kiu rezidas en Petropolis⁶ kaj verŝajne estas la brazila disvastigisto de la nova lingvo, sendis al mi ekzempleron de tiu gazeto.

La rapida tralego de la periodaĵo kaj de kurioza broŝuro ĝin akompananta, en kiu troviĝas kelkaj eroj de la vortaro kaj de la gramatiko de *esperanto*, senserĉe donis al mi kelkajn nociojn. Se mi havus tempon por tio, mi estiĝus fervora esperantisto.

Okazas, ke *esperanto* estis laŭdata de Max Müller, kiu laŭdire estas la plej granda lingvisto de nia epoko, kaj ĝi ricevis laŭdojn ankaŭ de Tolstoj, Henry Phillips kaj de aliaj tutmonde rimarkindaj homoj.

Tolstoj skribis la jenon: "*esperanto* estas tiel facile lernebla, ke mi, ricevinte gramatikon, vortaron kaj kelkajn artikolojn en tiu lingvo, post du horoj, sukcesis, ne skribi, sed almenaŭ glate legi en tiu lingvo". Estas vere, ke ne ĉiuj havas la inteligenton de Tolstoj...

Mi ne volas devojiĝi en konsiderojn, kiuj kompreneble troviĝas en la menso de ĉiuj miaj legantoj, pri la konveneco de lingvo internacia; mi simple rekomendas *esperanton*, kiu, mi esperas, eliros la venkinta el sia profunda disvastigado.

Mi finas ĉi tiun leĝeran artikolon, transskribante la *Patron Nian*, en nian lingvon⁷:

"Patro nia, kiu estas en la cielo, sankta estu via nomo; venu regeco via; estu volo via, kiel en la cielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ciutagan donu al ni hodiaŭ; kaj pardonu al ni suldojn niajn, kiel ni ankaŭ pardonas al suldantoj, kaj ne konduku nin en tenton sed liberigu nin de la malbono. Amen."⁸

Unuavide, ĝi ŝajnas la provenca aŭ la kataluna – sed kredu, ke ĝi estas nenia Kimero⁹.

A.A.

¹ Espe: La Lando.

² Espe: Prelego.

³ Portugallingva originaĵo ĉe <http://www.esperantopt.com/dosieroj.html>

⁴ Espe: Societo por la disvastigo de esperanto. Vizitu: http://eo.wikipedia.org/wiki/Societo_por_propagando_de_esperanto

⁵ Espe: La esperantisto.

⁶ Urbo en la subŝtato Rio-de-Janeiro, kie la Imperiestra Moŝto Petro la 2-a kutimis trasomeri.

⁷ En la originaĵo "nosso idioma", laŭ la konsultita reta dokumento. Se ne estas mistajpo, oni komprenu la kor-proksimiĝon de Arturo al esperanto tiel, ke, eĉ ne lerninte esperanton, li ĝin nomas "nia lingvo".

⁸ Precize kiel en la originaĵo, kie ne estas supersignoj.

⁹ Aŭ *Ĥimero*: monstro kun leonkapo, kaprokorpo kaj serpentvosto, mortigita de Belerofono. Metafore, komplika aŭ konfuziga afero. La portugala teksto enhavas "bicho de sete cabeças", laŭlitere *besto kun sep kapoj*; temas pri popola esprimo ankoraŭ nun vaste uzata en portugallingvujo.



El la portugala muzo...

Recenzo:

Amo per proverboj, Esperanta-Portugala Proverbaro

de João José Santos

aŭtoro: Arturo Azevedo¹, L. L. Zamenhofo
tradukisto: A. Couto Fernandes
lingvo de l' originaĵo: portugala, esperanta
eldonis: Brazila Esperanto-Ligo
paĝoj: 172
formato: 19cm x 14cm
eldondato: ekde 1920
trovebla: ĉe PEA² kaj UEA ankoraŭ troveblas
 brokante

Jen la ununura esperantigita verko de la konata brazila dramisto Arturo Azevedo, antaŭ ol la esperantigo de liaj verkoj aperantaj en ĉi tiu numero de La Karavelo.

Fakte, la libro konsistas el du verkoj: la unua estas *Esperanta-Portugala Proverbaro* de Zamenhofo, kaj la dua *Amo per proverboj* de Arturo Azevedo.


Amo per proverboj estas komedieto, legebla en horduono, en kiu juna vidvina pimpulino rifuzas amproponojn de maljuna malbela fraŭlo, kiu ĉion diras pere de proverboj. Li insistas, sed ŝi nur akceptas post... nu, legu vi mem la verkon.

En la komedieto ludas tri roluloj: Izaio, Agnezo kaj leteristo. Ĝi konsistas el ununura akto kun sep scenoj. Ĝia aktorado por esperantista publiko certe amuzas la spektantojn, kaj plialtigas la vortprovizon kaj fluecon de la praktikantoj de esperanto.

Arturo konstruas en ĉi verko multajn dialogojn, en kiuj Izaio preskaŭ ĉiam sin esprimas per enkatenigitaj proverboj, tre bone interplektitaj. Pli mirinde ankoraŭ estas la fakto, ke Arturo tion verkis, kiam li estis... 15-jaraĝa.

¹ Esperantigita nomo el la portugala *Artur Azevedo*.

² Portugala Esperanto-Asocio.



Kovrila faksimilo de la ununura verko de Arturo Azevedo, ĝis nun eldonita en esperanto: Amo per proverboj.

Ne malpli lertas la laboro de Couto Fernandes, kiu plukis el la zamenhofa proverbaro la sinonimajn proverbojn por rekonstrui la dramon en esperanto.

Kiel dirite, en la sama libro, ankaŭ aperas alia verko: *Esperanta-Portugala Proverbaro*. Ambaŭ verkoj prezentiĝas en ambaŭ lingvoj, live³ en esperanto, dekstre en la portugala. La indekso kaj la enhavtabelo sufiĉe bonas, esperante kaj portugale. Tiel, ĉi libro estiĝas ankaŭ konsultebla referencolibro, kiam oni bezonas la adekvatan proverbon por iu situacio.

La lingva stilo estas klasika, t.e., popola esperanto-lingvonivelo, kaj ne povus esti aliel, ĉar proverboj radikas el la popola praktika filozofio pri la vivo, kaj la uzado de proverboj estas la esenco de ĉi tiu libro.

Jen do du ĝuindaj verketoj en unu libro, kiu ne pretendas esti erudicia, sed havas la meritojn esti amuza kaj didaktika.

Ŝajnas, ke *Amo per Proverboj* ne facile troviĝas en niaj libroservoj. Prenu ĝin en ambaŭ lingvoj el nia retejo:

<http://www.esperantopt.com/dosieroj.html>

³ Sinonimo de *maldekstre*.



Bildo de Roger Gotardi

El la portugala muzo...

**trad. Roger de Castro
Gotardi**

La maljuna Limo

de Arturo Azevedo

La maljuna Limo, kiu estis ŝtadungito — malnova ŝtadungito — en unu el niaj publikaj oficejoj, kaj loĝis en *Engenho de Dentro*¹, ekkuŝis surlite, grave malsana, la 14-an de novembro 1889, tio estas, en la antaŭtago de la proklamo de la Respubliko de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo.

La malsanulo ne konsideris la malsanon io prizorginda, kaj tial li ne volis kuraciston: al li sufiĉis kelkaj hejmfaritaj resanigiloj, karese uzigataj de brilhaŭta mulatino, kiu de dudek-kvin jaroj lin traktadis sindediĉeme, kaj pri amo kaj pri kuirado. Tamen, la maljuna Limo kuŝis malsana ok tagojn.

Nia viro havis la kutimon ne legi ĵurnalojn, kaj, kiel hejme oni diris al li nenion (ĉar oni nenion sciis), li entute nesciis, ke la Imperio transformiĝis en Respublikon.

La 23-an, resaniĝinta kaj preta por alia malsano, li aĉetis biletan, laŭ sia kutimo, kaj sidiĝis en la trajno, apud la Komandoro Vidalo, kiu lin salutis per ĉi tiuj vortoj:

— Bonan tagon, civitano.

La maljuna Limo trovis stranga tiun *civitano*, sed li pensis, ke la komandoro diris tion kvazaŭ li dirus *eminenta*, kaj ne tre atentis al la saluto, limigante sin respondi!

— Bonan tagon, komandoro.

— Neniul komandoro! Nomu min Vidalo. Jam ne estas komandoroj!

— Nu! Kial do?

¹ *Engenho de Dentro* [en'jeño de 'dentro], esp.: *Ena Sukerfabriko*. Temas pri kvartalo en la norda parto de Rio-de-Janeiro. Ĝia origino datiĝas de la kolonia epoko, kiam tie estis sukerfabriko, laŭ kiu oni nomis ĝin.



Artur Azevedo
(1855 - 1908)

— La Respubliko malaperigis ĉiajn insignojn! Ili neniiĝis!...

La maljuna Limo alokulis la komandoron kaj silentis, dubtimante, ke li mem ne komprenis la anekdoton.

Pasinte kelkaj sekundoj, demandis lin la alia:

— Kiel vi statas sub Aristido?

— Kiu Aristido?

— Silvejro Lobo.

— Mi!... Kie?... Kiel...?

— Diable! Ĉu Aristido ne estas via ministro? Ĉu vi ne estas dungito ĉe oficejo de la Ministerio pri la Landinterno?...

Ĉifoje ne restis en la spirito de la maljuna Limo la plej malgranda dubo, ke la komandoro frezeziĝis.

— Kion eble faras ĉimomente Petro la 2-a? — demandis Vidalo, pasinte kelkaj momentoj. — Sonetojn, kompreneble, jen pri kio plej multe okupiĝas tia ulo!

"Nu, vidu", pripensis la maljuna Limo, "nu, vidu, kio estas malsaĝiĝi: tiu ĉi viro, kiam disponis je sia saĝo, estis tiom monarkista, tiom amika al la imperiestro!"

Tamen, la maljuna Limo indignis, vidante, ke la subpolicestro de sia paroĥanaro, sidanta en la trajno, fronte al li, aprobis per rideto la perfidon de la komandoro.

— Polica aŭtoritatulo! — grumblis la maljuna Limo.

Kaj la komandoro aldonis:

— Mi volas vidi nur, kiel la brazila ministro ricevos Petron la 2-an en Lisbono; probable li alvenos tien en la komenco de la monato.

La maljuna Limo kortuŝiĝis:

— Li parolas sensencaĵojn, kompatinda!

— Kaj la flago? Kion vi diras pri la flago?

— Aĥ, jes... la flago... jes... — ripetis la maljuna Limo, por ne kontraŭi lin.

— Kiel vi preferas ĝin: kun aŭ sen devizo?

— Sen devizo — respondis la bona homo per tono profunde domaĝa; — sen devizo.

— Ankaŭ mi; mi ne scias, kion signifas flago kun surskribo.

Ĉar la trajno longe daŭris ĉe unu el la stacioj, tial la maljuna Limo turnis sin al la subpolicestro kaj diris al li:

— Ŝajnas, ke ni restados tie ĉi! Estas pli kaj pli malbona la servo de Petro la 2-a!

— Kiu Petro la 2-a! — kriegis la komandoro. — Tio jam ne estas de Petro la 2-a! Li kontentiĝu per la kvin mil rejsomiloj!

— Kaj iru inferen! — aldiris la subpolicestro.

La maljuna Limo stuporis. Li prenis la decidon eksilenti.

Alveninte al la Aklamoplaco², li eniris tramon kaj iris ĝis sia sekretario, rimarkante nenion kaj aŭdante nenion, kio aktualigus lian konon pri la okazintaĵo.

Li rimarkis tamen, ke iu vandalo estis tre okupata, forprenante la imperiajn kronojn, kiuj ornamis la kradaron de la Aklamoparko³...

Enirante en la sekretariojn, nigra kaj malbone vestita oficejservisto ne salutis lin kun la kutima humileco; li diris al li nur:

— Civitano!

“Hodiaŭ oni emas min nomi civitano!” — pensis la maljuna Limo.

Suprenirante, li renkontis, sur la ŝtuparo, longtempan konaton.

— Ho! Vi ĉi tie! Revoluciulo en ŝtat-oficejo!...

La amiko ceremonie salutis lin.

“Verŝajne li fariĝis gravulo!” pripensis la maljuna Limo.

— Morgaŭ mi foriros al Paraibo⁴ — diris la ceremoniulo, etendanta al ili la fingropintojn. — Kiel vi scias, mi okupos la postenon de policestro. Tie mi estos je via dispono.

Kaj li foriris.

— Mi tuj perceptis! Kia senhontaĵo! Fervorega respublikisto!...



Foto de Artur Azevedo sur faksimilo de lia skribaĵo

Enirante en sian sektion, la maljuna Limo rimarkis, ke malaperis la pezkurtenoj.

— Tre bone! — li diris al si. — Estis bona rimedo elimini tiujn pezkurtenojn nun, kiam estas alvenonta la varma sezono.

Li sidiĝis kaj vidis, ke oni demetis de la muro malnovan litografiaĵon, reprezentanta Moŝtan Petron de Alkantaro. Ĉar tiam preterpasis paperportisto, li demandis lin:

— Kial oni demetis de la muro la portreton de Lia Imperiestra Moŝto?

La paperportisto respondis per tono malrapide malestima:

— Nu, civitano, kion tie faris la bildo de Petro Banano?

— Petro Banano! — elfurioze ripetis la maljuna Limo.

Kaj, sidiĝante, li malĝoje pensis:

“Mi ne kalkulos tri jarojn ĝis kiam ĉi tio iĝos respubliko!”

www.esperantopt.com

² Portugale: *Praça da Aclamação*.

³ Portugale: *Parque da Aclamação*.

⁴ Nordorienta subŝtato de Brazilo. La vorto *Paraibo* (portugale *Paraíba*) venas el la tupia, kaj ĝi signifas *maltaŭga rivero*.

El la portugala muzo...

La ĉemizo

*de Fialho de Almeida¹**trad. Eduardo Novembro, el la portugala
notoj de JJS*

Post traserĉado tra la londonaj antroĵoj, ekzekutisto por eltrunkigi la kapon de la bona reĝo Karlo² ne estis ankoraŭ malkovrita de Kromvelo³.

Alvenis la lasta nokto por la martiro, sed pri lia mortiganto neniam novaĵo ankoraŭ. La tutan tagon la surprizitaj gardistoj, la servilaj funkciuloj kaj la altrangaj personoj de la lando rimarkadis la obtuzan koleron de tiu fera homo, kiu livide kaj mute paŝis tien kaj reen tra la palaca halo.

Je noktomezo revenis la lasta serĉagento, ne trovinte la bezonatan brakon por helpi al la pendigo en la murdejo. Sidantaj sur kverkaj taburetoj remburitaj, kun najlaro kaj orumitaj reliefoj, la grandaj patriotoj, nigre vestitaj, paliĝadis en la funebra silento, atentante la tutan ciklonon de briditaj koleroj ĉe la mieno de la protektanto.

Antaŭ ol tiu faris iun ajn signalon, larĝ-sultra maljunulo stariĝis kaj, per trankvila voĉo kaj gestoj de honesta simplulo, parolis:

— Mi iĝos la ekzekutisto de la alta justico!

Eĉ ne rigardante lin, Kromvelo frapis sur la tablon:

— Morgaŭ je la kvina!

Kiel ombroj solviĝantaj en blankan ekranon, la patriotoj eliris malrapide, sin kaŝantaj sub manteloj. Pluvis, kaj el la karbokolora ĉielo trafenetrita de turoj kaj gotikaj frontispicoj, iu funebra melankolio silente disetendis la flugilojn super tiun nigreskan misteron, terurigan kiel la morto. La sekvan tagon, je la kvina, la ekzekutisto staris ĉe sia posteno, ruĝe vestita, duonmasko survizaĝe, kaj akra blankpinta menton-barbo ĉe la brusto. Kaj jen, la kapo de

Stuarto⁴ falis antaŭ la amasplena kaj nebulperpleksa placo.

— Bone... — Kromvelo diris. — Kion vi volas kompanse por via ĵus plenumita servo? La regna kaso estas elĉerpita, sed petu la orvaloron, kiun vi deziros. La severa vintro detruis la rikoltojn kaj malsatmortigis la servutulojn, sed nomu la bienarojn de vi postulataj. En Londono, estas mirindaj palacoj ne apartenantaj al la Ŝtato, kaj viaj ili fariĝos laŭ via plaĉo. Diru, do!

Nur ion la maljunulo volis; kaj elvortigonte li tiun ununuran deziron, la patriotoj tremis pro timo esti senposedigataj.

— Kion? — Kromvelo insistis.

Post senvorta momento, li elparolis:

— Vi donos al mi la sange priverŝitan ĉemizon de la senkapigito.

— Nenion pli?

— Nenion pli!

Kromvelo ne sin retenis, dirante:

— Kiel viro el via harditeco estas frivola kiel virino?

La maljunulo ruĝiĝis pro la insultaĵo, kaj replikis:

— Maldankemulo!

Kaj foriris. Sed, en la posta tago, li ricevis la ĉemizon makulita de la reĝa sango.

Tiun famili-trofeon oni enŝlosis enen de ĉizita kofro, sur kies fermoplatato latina gravuraĵo memorigis la faron, per solena stilo anglikane emfaza, en bibliaj versikloj. Tra postaj jararoj, la posteuloj de la ekzekutisto ricevis respektoplenon de Anglujo pro la predo enmetita en la orvalora kesto. Ĉi tia respektopleno pli malfrue sidigis nepon de la kapricema sikario de Kromvelo en la Superan Ĉambron, kaj elkraĉis sur la dukan uniformon, de li vestita, generalan strion de ordenoj kaj medaloj. Baldaŭ, lordo Wite, duko de Clifton kaj rekta reprezentanto de aristokratigita familio, fariĝis ministro kaj centoble milionulo.

En iu jarsezono, el ĉiuj lokoj de Anglujo, eliris amasego da erudiciuloj avidaj je la ĉemizo, vojcele al la kastelo de Clifton, plenesperaj ricevi de la proprietulo indulgon por ilin permesi la netakseblan komplezon, dum kelke da sekundoj, kontempli la relikvon de la reĝo sankta. Sinjoroj kaj servutuloj altrudis al si pilgrimadon al Clifton, almenaŭ unu fojon en sia vivo. Pri la koloro, aspekto kaj makuloj de la respektinda ŝirpeco, strangaj versioj

4 Karlo La Unua apartenis al la dinastio *Stuart*.

1 José Valentim Fialho de Almeida (1857-1911).

2 Reĝo Karlo La Unua, de Anglio.

3 Oliver Cromwell (1599-1658), brita politikisto, kiu regis Anglion, Skotion kaj Irlandon en la lastaj kvin jaroj de sia vivo.

ekdisvastiĝis tra la mondo. Broŝuroj menciis, ke temis pri noktoĉemizo; enormaj foliantoj supersarĝitaj de paciencaj kaj subtilaj reserĉadoj eĉ aŭdace asertis, ke ĝi estis nek nokta nek ordinara ĉemizo, eĉ ne kamizolo, tamen simple kaj honeste kalsono.

Spektinda estis la lukto tiam estiĝinta, la privetoj pro tio okazintaj, same kiel la dueloj per pugna aŭ pied- eĉ korno-batoj, kaj ankaŭ per pafaĵoj. En Oksfordo kaj Kembriĝo, tra ĉiuj grandaj kolegioj kaj kluboj, la junularo forgesis kriketon kaj forlasis remilojn por dissplitiĝi en koteriojn — kelkaj suprenirantaj la ĉemizon, aliaj flirtantaj la kalsonon surpinte de pikstango.

En la gotikaj klostroj kaj en embuskejoj de la mezepokaj sakstratoj tenebrigitaj je malfruaj horoj, ĉiufoje kiam ombrofiguro spitis alian, tuj oni blekis per angla kuriozeco:

— Kiu vivas? Ĉu la ĉemizo aŭ la kalsono?

Estante kontraŭuloj la kverelantoj, tuj estiĝis batalo kaj la sango fonte elŝprucis, ĉu de venkitoj, ĉu de venkintoj.

Tiuj mortontaj, plenesprimis ĉe la lasthora stuporo:

— Mi mortas por la kalsono!

Raportante la okazaĵon, la ĵurnalo Times skribis:

«Unu plia viktimo de la subvesto de lia reĝa moŝto...»

Nu, sub tiaj cirkonstancoj, komitato de saĝuloj kaj filozofoj, kune kun kelkaj el la plej bonaj londonaj ĉemizfaristoj, estis enoficigita de la reĝina estraro por studi la problemon kaj restarigi la deziratan publikan trankvilecon, en tiel turmentitaj travivaĵoj. La Supera Ĉambro aprobis milojn da pundoj por tiu viglega tasko de la anglaj scienco kaj tolaĵaro. La ĵurnaloj publikigis fotojn, kaj biografiojn de la komisiistoj, ilin kuraĝigante per akraj stimuloj. La famaj kluboj malfermis al la elektitaro siajn konferenc- kaj manĝo-salonojn; ĉiel privetoj ripetadis kaj la dueloj multobliĝis.

Samtempe pluvis el la presejoj pezaj broŝuroj riĉe provizitaj de iaj detaloj. Laŭ D-ro Kater la tolaĵero en la kofro gardita estis kalsono, konsiderante la nigran teksadon, kiu limdifinis la disdubiĝon de la manikoj — vidpunkto meritinta solenan sesion al la londona Kolegio de Kirurgoj. Laŭ oni induktis el la aktoj kaj bultenoj de tiu altvalora societo, la plektado erarigis la kalsonon, ĉar la scienco konfirmas la malstreĉon de iuj muskoloj pro la senkapigo. Sed la supera angla kemio, silente sciinte pri la debato, intervenis petante restaĵeton, eble eĉ se infiniteziman de la substanco, por ke, per la

modernaj analizaj procedoj, oni povus lanĉi la ultimaton, kiun la afero urĝendis. Tamen, la angla publiko tion malpermesis, tiel estis la respekto de la saksoj por siaj monumentoj. Kaj pere de solena protestaro, ducent mitingoj sentigis al la estraro sian volon pri la tolaĵo de la bona reĝo Karlo Stuardo.

Moŝta sinjoro Bell, la tribunulo, eldiris genian paroladon, nomante sendigna kaj krima tiun, kiu tuŝus eĉ nazpinte la nigran medalionon de la relikvo.

— ... Ja ĝi estas unika en sia speco, kaj la Martiro ne povos regali la muzeojn de la Unuiĝinta Regno per io tiel rava! — li resumis meze de tondra aplaŭdado.

Fotistoj kaj pentristoj, kune kun siaj aparatoj kaj stabletoj, venis pie al la kastelo de Clifton por reprodukti la strangetan obstinecon, kiu estiĝis tiom da duboj.

Kaj per vendado de kopioj por du ŝilingoj, en unu tago kaj duono, oni riĉiĝis, aklamite tra la placoj kaj stratoj de la urbego.

Lordo Clifton, per nobela malavareco, malfermis siajn pordojn al pilgrimantoj kaj saĝuloj. Li estis enkadriginta vitron sur la fermoplato de la ora kofro, konservanta la sanktan subvesteron, honorinte sian domon, kaj kaptante la atenton de grandnombra popolo.

— Tiele kliniĝu vi antaŭ tiom altvalora dokumento de reĝo bona. — la duko diris el sia parlamenta poltrono. — Kion do vi farus se, kiel la ĉiam priparolita mano de mia klera avo, vi estus palpinta ĝin freŝa, en ekstazo, kaj alproksimiginte ĝin al la lipoj por respektoplena kiso!...

Kaj tra la respektindaj blankaj barboj gutadis larmofluetoj.

Post unujara diskutado, elokventegaj konferencoj kaj plej katedralaĉaj supozoj, la granda saĝulkomitato resume decidis, ke unu el du:

1-a — Aŭ, en la tempo, kiam regnis la reĝo Karlo, kiel rafinita eleganteco, el la gamboj oni faris brakojn, kaj tiaokaze la ĉifono de Clifton estis sendube ĉemizo konfekciita por senkapigito, sen malfermaĵo intermanike, kaj do la maŝo povus esti klasita kiel sangmakulita...

2-a — Aŭ, male, kalsono, konsekvence la maŝo...

Postiris pudora latinaĵo por ekspliki la konsiston de la historia intermiksado.

Jen estiĝis konfuzaĵo ĉiudirekten! En la bibliotekoj svarmis arkeologoj kaj erudiciuloj serĉantaj, ĉu en la tempo de Karlo fakte estus

galanta talento eŭropa per la manoj marŝi surtere.

La purhaŭtaj kaj safirokulaj damoj ruĝiĝis ĉe la penso je renoviĝo de la rafinaĵo. La moderaj respublikistoj, duonpotencaj jakobenoj aŭ sinceraj ruĝuloj, kriegis en sekretaj konklavoj kontraŭ la diboĉado kaj stultiĝo de reĝaroj kaj aristokratiistoj, ĵurante ke la Franca Konvencio kaj la Uzurpado de Kromvelo estis oportunaj por fortirado de komunumoj, kiuj strebis konduki la homaron al translokaj kutimoj de veraj kruduloj.

Novaj paroladoj, novaj kunsidoj, novaj dueloj kaj novaj broŝuroj. El la angla ministraro elradiis oficiala letero al la regnoj, demandanta komparojn kaj plendetalajn paralelojn de moroj, en la proponita historia ciklo.

Inter ridoj, Francio deklaris, ke Ludoviko La 16-a estis plej bonspeca primato, nur uzinte siajn manojn por subskribi dekretojn de li ne legitajn, porti al la buŝo bonegajn ĉokoladajn pasteĉojn, aŭ per poltrona sintenado peti indulgon dum sia doloriga kaptitado.

Italio kaj Hispanio taksis la problemon kiel rasan nuancon, kaj malestime ŝultrumis, fieraj pro sia latina naskiĝo. Germanio ekmeditadis. Nur Portugalio, je simpatia impulso por sia historia aliancano, respondis, ke depost Ourique⁵, en la epoko de Tareja⁶ kaj de la galego Trastamara⁷, ŝia amanto, kiam oni kutime apartigis la plebon de la nobelaro, ĉi-lastata inversigadis la movigilojn, sin metante ĉirkaŭ la princojn kun la kapo turnita surteren kaj la piedoj ĉielen, dum la grandaj vesperfestenoj kaj gastigadoj⁸.

Koncerne la demandon, ankoraŭ pasis jaroj, kiuj samtempe teren kurbigis la vertebraron kaj la blankan kapon de lordo Clifton. La duko ne havis rektajn posteulojn. Li estis severmora kaj nesimpatia maljunulo, soleca en sia dukeco kaj posedanta la plej bonan ruran riĉecon de

5 Post la Batalo de Oriko inter Don Afonso Henriko (unua reĝo de Portugalio) kaj la arabaj fortoj, Don Afonso Henriko sin proklamis reĝo de Portugalio.

6 Don Tereso, patrino de Don Afonso Henriko.

7 Fernão Peres (esp: Fernano Pereso), galego kiu estiĝis kunulo de Don Tereso, kontraŭ kiuj Don Afonso Henriko devis lukti, politike kaj milite, por sendependigi Portugalion.

8 La alianco inter Anglio kaj Portugalio estas unu el la plej antikvaj de la mondo. Tamen, portugaloj ĉiam sentis, ke tia alianco nur favoris Anglion. Verdire, kiom da angloj scias, ke ili havas ian aliancon kun la portugaloj? Tamen, ĉiuj portugaloj scias, ke tia alianco ekzistas, kaj ke ĝi estas tre antikva. En la lasta alineo, la aŭtoro reliefas la stultaĵon de la portugaloj, kiuj hundeske ĉiam favoras Anglion, eĉ en situacioj, en kiuj la logiko ordonon ne fari tion.

Britujo.

Li tre amis la maljunulinon, kiu mastrumis lian domon, kaj kiu antaŭe estis vartistino de la blonda Ellen — estonta dukino, se la krupo ne estus strangolinta ŝin dek-ses jaraĝa, la kompatinda! Refoje la estraro proponadis al la duko, kontraŭ fabelaj sumoj, la vendon de la vestopeco de Karlo Stuardo. La reĝino propramane skribis al li longan familiar-afablan leteron pri la relikvo, emfazante, ke iĝus vera krimo ĝin lasi ekster la landaj arkivoj — eble perdota en posedo de privatuloj kaj de fremdlandaj brokantistoj. Sed Clifton rifuzis ĉiujn proponojn pretekstante, ke la postlasaĵo estis familia fidgarantio interligita kun grandaj rememoroj kaj legendoj.

Jam en la aĝo de okdek kaj pluraj jaroj, sentante sin kliniĝanta al la tombo, lordo Clifton, en iu mateno de neeltenebla podagro, sciigis la estraron, ke la ĉemizo, kalsono aŭ kio ajn tio estus, eniros la Muzeon de South Kensington ĝuste la saman tagon, kiam li fermos siajn okulojn, por ke en la kastela ostujo oni loĝigos lian lazurŝtonan sarkofagon, subtenotan de dek leopardoj ornamitaj per deko da ŝildoj. La nobla intenco de la lordo emociigis la fieran kaj grandan Anglujon. Ĉiuj kluboj homaĝis la bonfaranton, la deputitaro kaj la reĝino superŝutis lin per plej altaj distingaĵoj, kaj la popolo siavice tondre ovaciis lin sub liaj palacaj fenestroj.

Ekde tiam ĉies demando estis:

— Kiam la bona duklorda Clifton fermos por ĉiam la okulojn?

En la honorsalono de Kensington, ĝia direktoro jam estis rezervinta lokon, ĉe la fundo de la ejo, sur gotika podio, inter la statuoj elterigitaj el Peloponezo, kaj inter flagoj forprenitaj el la francoj en la grandaj bataloj por la Imperio.

Iun vintran vesperon la ĵurnaloj anoncis la morton de la lordo.

Dum ĉiuj sociaj klasoj venis funebre kaj gravmiene defili antaŭ la enterigo, deligitaro de saĝuloj, prezidita de princo Karlo, supreniris la ŝtuparon de la sinjor-domo por konduki al la Muzeo la donacon de la mortinta duko.

Ha, kompatinda gento!...


El la kofro estis malaperinta la vestopeco de Karlo Stuardo, ĉemizo, kalsono, aŭ kio ajn tio estus, kiun la mastrumistino — purema virino de la land-altaĵoj — tie vidinte la bedaŭrindan ŝirpecon, ĵetis ĝin en la lesivon de la lavistinejo...!



Vivanta scienco surstrate en Estremozo

En la 5-a kaj 6-a de julio 2008, la scienco kaj la arto kuniĝis sur la stratoj de Estremozo. Sep sciencaj okazoj plej gravaj, en la homara historio, estis eksplikataj al la publiko en sep diversaj lokoj de la urbeto: la juĝado de Galileo, la hemisferoj de Magdeburgo, la pendolo de Fukoto, la "eŭreka" de Arkimedo, la sferoj de Bufono, la falo de la korpoj, la strukturo de DNA. Maŝinetoj kaj sciencaj provadoj estis je la dispoŝo de ĉiu ajn. La teatrigo de la sciencaj okazoj, pri kio la fotoj donas palan ideon, ravis ĉiujn.

teksto de João José Santos
fotoj de João Pereira dos Santos



Lageto de Estremozo estiĝis teatra scenejo.



Arkimedo pensas pri la solvo de la problemo proponita de la reĝo Hierono.



Ses aktoroj ludis en la lago. Du restis ekstere, ludante muzikilojn.




Du altsociaj damoj de la epoko de Njutono.



Teatra reprezento ĉe la kastelo.



Ekspliko pri la gravito.



Aktoro malgrimpas la turon de la kastelo.



Post ĵongla spektaklo, scienca klarigo.



Galileo, reprezentita de kvar knabinoj, timas antaŭ la juĝistoj. Malantaŭe estas la urbodomo.

www.esperantopt.com